

Mia Devuelo

ALDONO POR LA JUNULARO ESPERANTISTA * N-RO 5 * AL HEROLDO N-RO 42 (695) [1932]

Fojnejo ne estas hotelo ...

„Ĉu ni povas tranokti en la fojnejo?“ demandis du junuloj en iu aŭgusta vespero kamparanon. „Jes, jes“, estis la respondo. „Grimpu supren sur la fojnon! Sed estu singarda, ne uzu alumetojn!“

Post ioma lavado kaj sekurigo de la bicikloj rapide krepuskiĝis, kaj la du junuloj grimpis supren sur la fojnon. Baldaŭ ili ekdormis. Sed post mallonga tempo komencis unu el ili turni sin jen dekstren, jen maldekstren. Iom pli poste li eĉ starigis sin kaj serĉis alian lokon. Vane. Ankaŭ tie li ne povis dormi. Estis eble la dekdua horo, kiam li iris al la senvitra fenestro kaj sidigis sin tie. Li rigardis la stelojn. Ĉiam kaj ĉiam li diris flustre al si mem: Neniam mi ree dormos en fojnejo! Tio estis la unua kaj lasta fojo.

Kio estis la kaŭzo, ke li, Karlo, ne povis dormi, dum Alfonso dormis kvazaŭ melo? Ambaŭ biciklis dum tri tagoj. La unuajn du tagojn ili dormis en litoj por malmultaj groŝoj. Sed hodiaŭ vespere ili volis fari ion, kion ili ne faris ĝis nun: dormi en fojnejo. Tio aspektis aventure kaj por li, Karlo, tio vere estis aventuro, kvankam ne plaĉa, ĉar li ne povis ekdormi malgraŭ laceco kaj dormemo. Tro odoris la fojno kaj dolorigis la kapon, kraketis fojneroj kaj lignaĵo, zumis noktaj insektoj, aldone li eksentis malvarmon.

Kaj Alfonso dormis! Li ne sentis malvarmon, lin ne ĝenis kraketado de fojno, lin ne tiklis la fojnotigoj.

Sed ne nur dum ĉi tiu nokto montrigis la diverseco inter Karlo kaj Alfonso. Al Karlo tute ne plaĉis la manĝado apud rivereto, li ne sentis kontentigon sidante sur puta rando, kiam li manĝis sian buterpanon. Dum Alfonso manĝis kun freŝa apetito. Karlo deziris manĝi almenaŭ en simpla gastejo sur tablo kun telero, pladoj kaj glasoj.

Malgraŭ granda antaŭĝojo kaj viglaj preparoj ambaŭ junuloj ne trovis harmonion kaj plenan-ĝuon de la malmultaj ferio-tagoj.


Kio estis la kaŭzo?

Karlo kaj Alfonso laboris en la sama metiĝo. Karlo loĝas en la grandurbo. Tie oni nek vidas fojnejojn, nek arbaron, nek kampojn. Neniam li vidis la kamparanan vivon de proksime. Nur grandaj domoj rigide staras apud la stratoj. Li pasigas siajn liberajn horojn en gastejoj kaj societejoj. Nur malofte li promenas en la parkoj.

Alfonso laboras en la grandurbo de mateno ĝis vespero. Sed li loĝas en malgranda urbeto, fore de la grandurba bruo. Liaj gepatroj posedas malgrandan bienon. Li devas labori dum siaj liberaj horoj en la negrandaj

kampoj kaj en la ĝardeno. Ĉiutage li vidas la vivon de la bestoj en la korto kaj stalo. Kaj dum somero li multe vagas en la arbaro kaj observas la vivon en la naturo.

Oni nun vidas la kaŭzon, kiel unu bonege dormis en la fojno, dum la alia ne povis fermeti la okulojn. Karlo simple ne konas la vivon en la naturo. Lin ĝenis laodoro de la fojno, la kuŝejo estis tro malmola, lin tunkigis etaj bruoj. — Dum Alfonso sentis sin komforte. Li trovis sanan refreŝigan dormon, ĉar li sciis: fojnejo ne estas mia hejma



Sigfrido ĉe la avino dum la ferioj.

La avino loĝas sur monto. Ŝi havas grandan loĝejon. En ĝi estas bela suma verando. Tie ni tagmanĝis. Apud la manĝotablo staras malgranda skribotablo. Super ĝi pendas multaj bildoj. Inter ili ankaŭ tri pipoj de la avo. Lutage mi prenis la plej grandan. Mi sidis en la seĝo kaj fumis, sed ne vere! Sen fajro! La avino ĝojis kaj diris: „Tiel agis la avo! Vi estas bona nepo. Kiam vi estos studento, tiam mi donos al vi la pipon de la avo!“

Siegfried Naumann, Grossenhain, Germ. (9-jara).

dormoĉambro, fojno ne estas lito.

Jes, la molofio grandurbo! Nj gejunuloj ne allasu, ke ĝi trapenetru nin tro multe. Ĉiujare dum niaj libertempoj ni fugu en la naturon, tiel ke civilizacio kaj naturo trovu samrajtan lokon en niaj menso kaj koro!

T o m o .

La eterna fajro.

El la Nederlanda Nacia Skolto-Tendaro en Katwijk ĉe la marbordo, skoltfrato Pruisen sendis al mi longan kaj tre interesan pri-

skribon. El ĝi mi povas publikigi nur malgrandan ĉapitron: tiun pri „la eterna fajro“ en la tendaro. La tendaron ankaŭ vizitis Lordo Roberto Baden-Powell, la fondinto de la skolta movado.

Malforgesebla estas io speciala de nia subtendaro A. Ekde la unua tago, je kiu estis malfermita la subtendaro, oni ekbruligis dum la unua subtendaro kunveno la „eternan fajron“. Ĝi brulas dum la tuta daŭro de la tendaro, kaj gardas ĝin ĉiuj partoprenantoj dum kelka tempo.

Plej krizaj por la fajro estas la unuaj minutoj: Ĉu la fajro restos brulanta?? La knabo, kiu faras la ceremonion, estas lerta. Dumtage, kiam oni pretermarŝas aŭ preterkuras, oni vidas la fajron kun malgrandaj flamoj. Sed se oni vidus ĝin nokte, kelkfoje ekstremetis la koro, vidante, ke la gardanto duondormante forgesas la eternan fajron. Pro nealdono de brulmaterialo ĝi iom post iom malfortiĝas kaj fariĝas malhelruga amaseto meze en la densa malumo. Subite konsciigas la gardanto pri sia neatento kaj rapide starigas sin, serĉas palpe kelkan brulmaterialon, kaj post nervema blovado li sukcesas plifortigi la eternan fajron. — Kalamniaj langoj diras mokeme, ke jam tri- aŭ eĉ kvarfoje estis sen flamoj la „eterna“ fajro.

La ĉerpopto.

Hodiaŭ mallongan fabelon verkitan de geknaboj kaj tradukitan de Hildegard Schützel, Gohlis, Germanujo.

Estis tago, kiam la poto ne volis labori. En iu nokto ĝi volis forkuri. Ĝi supreniris sur la fornobenkon por rigardi el la fenestro, sed ĝi refalis en la ĉambron. Matene venis la mastro. Li murmuris en sian barbon, ĉar li devis pli frue ellitiĝi ol la aliaj. La poto ricevis puŝon ke ĝi falis en la angulon. La poto koleriĝis. Ĉar la pordo ne estis fermita, ĝi foriris eksteren.

Kiam ĝi estis sur la strato, la bruo de aŭtomobiloj kaj la multaj homoj tre timigis ĝin. Ĝi estis tre malgaja, ke ĝi ne restis hejme. Ĝi rapidis hejmen, kaj la gemastroj akceptis ĝin kun ĝojo, kaj ĝi restis en la domo ĝis la morto.

Esperanto en la lernejoj.

En iu venonta numero mi intencas publikigi bildon de Esperanto-muro en lernejo. Mi volas ĝin ĉirkaŭi per artikoloj pri Esperanto-lernado en lernejoj. Ĉiuj, kiuj lernas kaj ankoraŭ lernas Esperanton en lernejo, sendu artikoletojn. Germanaj sendontoj ricevos ekzempleron de la Heroldo-Junularo-Vortaro, negermanaj ricevos n-ron 2 de la Junula Biblioteko: „Kiki“. Mi direktas mian peton ankaŭ al instruistoj, kiuj instruas en lernejoj, kaj petas ilin pri instigo al verkado.

T o m o .

TIM KAJ TAM O JAĜAS TRA LA MONDO

Kvina ĉapitro:

La maljuna ĉasisto. La mistera sago.

Post kiam Tim kaj Tam en la kabano de la nekonato matenmanĝis, ili kuŝigis sin por dormi. Pro la multaj streĉoj de la pasintaj tagoj kaj noktoj ili estis tre lacaj. Do ili troviĝis baldaŭ profunde en la regno de la sonĝoj.

Kiel longan tempon ili dormadis, tion ili ne sciis. Sed subite vekigis Tim. Li sentis sin tiritaj je sia jako kaj aŭdis ĝeman bojetadon. Malfermite la okulojn, li vidis antaŭ si la vizaĝon de hundo. La besto sangis el kelkaj vundoj. La bojetado vekis ankaŭ Tam'on.

Rapide ili ambaŭ leviĝis de sur la kuŝejo. Demande ili rigardis la vizaĝon de la hundo, kaj poste ili rigardis unu la alian.

„Eble ĝi apartenas al la posedanto de la kabano“, diris Tim.

„Sed kion ĝi volas de ni?“ demandis Tam.

„Ĝi estas vundita. Eble ankaŭ lia mastro vundiĝis, kaj ĝi venis voki por lia helpo“, respondis Tim. „Ni sekvu ĝin kaj vidu!“


„Mi timas“, diris Tam.

„Prenu do vian poŝtranĉilon en la manon! Mi faros same!“ konsilis Tim. „Se vin volos ataki sovaĝa besto aŭ malbona homo, mort-piku!“

Tam prenis sian poŝtranĉilon el la poŝo kaj rigardis ĝin malfide. Ĝi ŝajnis al li ne taŭga armilo. Dume Tim jam sekvis la hundon. Tam ne volis ŝajni malkuraĝa kaj ankaŭ sekvis.

La hundo kuris antaŭen, malsupren de la altaĵeto kaj en la densan arbaron. La knaboj sekvis tiel rapide, kiel ili povis. La irado en la praarbaro estis tre malfacila.

Ili iradis eble duonan horon, kiam la hundo haltis apud la korpo de homo, ŝajne



Dekdu plus du estas dekkvar.

(Vidu „Nia Revueto“, n-ro 3, unua kolono!)

mortinta. Li estis maljuna viro, kun grizaj haroj kaj samkolora barbo. Liaj vestoj estis kovritaj de sango. Tim kaj Tam klinis sin super lin kaj esploris lian koron. Ĝi ankoraŭ batis. Dume la hundo ne ĉesis ĝeme bojetadi.

Subite la viro malfermis la okulojn. Vidante la knabojn, li ekmiris. Li demandis ion, kion ili ne komprenis.

Tam rigardis senkonsile sian amikon Tim. Ĉi tiu diris al li: „Dum nia vojo ni transpaŝis rivereton. Ni portu la viron tien kaj lavu liajn vundojn.“

Estis tre pena vojo tra la praarbaro kun la peza ŝarĝo. Krom tio, ili mem estis ankoraŭ lacaj pro la streĉoj de la pasintaj tagoj. Sed ili tamen estis fortaj junuloj, kaj la rivereto estis proksima. Tie alveninte, ili deprenis la jakon kaj la ĉemizon de la maljunulo. Ili konstatis, ke li havas grandan vundon ĉe la maldekstra ŝultro kaj alian sur la brusto.

Ili lavis kaj bandaĝis la vundojn tiel bone, kiel ili povis. La viro ŝajne streĉis sian tutan forton. Li provis ekstarti kaj sukcesis pene. Apogite sur la ŝultroj de la knaboj, li lamiris inter ili ĝis la kabano. Tie li tuj falis senkonscie sur la kuŝejon.

La vundoj de la maljunulo aspektis gravaj, sed ili ne estis vivdanĝeraj. Malbone estis, ke li perdis multe da sango. Pro tio li refortiĝis nur malrapide dum la postaj tagoj.

Montriĝis, ke la maljuna viro parolas krom sia gepatra lingvo — li estis anglo — iom ankaŭ la francan kaj hispanan lingvojn. Pro tio oni povis interkompreniĝi ne perfekte sed sufiĉe. Ili rakontis al li, kion ni jam scias, kaj ankaŭ li rakontis sian historion. Li estis ŝiprompiĝinto, same kiel ili. Li konstruis al si tiun ĉi kabanon antaŭ multaj jaroj, kaj li vivas de ĉasado kaj fiŝkaptado. En la tago, kiam la junuloj lin trovis en la arbaro, li refoje estis ĉasinta, kaj tiam li estis atakita de sovaĝa besto. Ĝi batis al li gravajn vundojn, kaj ankaŭ lia fidela hundo iom suferis; sed fine li sukcesis mortigi la sovaĝan beston. Li povis reiri hejmen; sed dumvoje li perdis la konscion. La hundo eble flaris, ke estas homoj en la kabano. Ĝi kuris tien, vekis la knabojn, kaj la ceteran scias niaj junaj gelegantoj.

Kompreneble, oni decidis, ke Tim kaj Tam provizore restu ĉe la maljuna ĉasisto.

Post unu semajno la ĉasisto estis tiom refortiĝinta, ke li povis leviĝi. Li instruis al la knaboj, kiel oni faras diversajn laborojn kaj kiel oni uzas la pafilon. En la peza kofro, kiu servis kiel tablo, li konservis malnovan pafilon kaj unu pistolon — krom tiu pafilo kaj pistolo, kiujn li mem kutime portadis kun si — kaj ankaŭ sufiĉan provizon da kartoĉoj. Post du semajnoj la ĉasisto (lia nomo estis Sam) denove povis iri por ĉasi. La knaboj kaj la fidela hundo Jim akompanis lin.


La vivo en la sovaĝejo plaĉis al Tim kaj Tam sufiĉe bone; sed ofte ili timis pro la sovaĝaj bestoj, kiuj estis multnombraj en tiu ĉi regiono; precipe ili timis la serpentojn.

Pasis du plujaj semajnoj. La maljuna ĉasisto kaj la junuloj fariĝis jam bonaj amikoj. Sed ĵutage okazis io, kion supozis nek la knabo nek eĉ la maljuna ĉasisto.

Estis tagmeze, kiam subite tra malfermita fenestreto de la kabano io flugis internen.

La ĉasisto kaj la buboj ĵus estis manĝantaj, kiam la stranga objekto flugis tra la fenestreto trans iliajn kapojn kaj fiksiĝis en la kontraŭa muro de la kabano. La objekto estis sago.

La ĉasisto salte leviĝis. Li kaptis je sia



En la sekvinta nokto, ĉe la brilo de la luno. (Vidu „Nia Revueto“, n-ro 3, tria kolono!)

pafilo, fermis la klapon de la fenestreto kaj tra fendeto en la klapo singarde rigardis eksteren. Li rimarkis nenion eksterordinaran. Li tiris la sagon el la muro, rigardis ĝin dum longa tempo kaj skuis la kapon.

„Dudek jarojn mi jam loĝas en la solecejo. Neniam vizitis min malamiko. Mi ne komprenas. Sed ni estas avertitaj. Ni devas prepari nin al defendo.“

La pafiloj kaj pistoloj estis ŝargataj, kartoĉoj pretmetataj. La maljuna ĉasisto ekstartis apud la pordo, Tim postenis ĉe la fenestreto rigardanta al la arbaro, kaj Tam ĉe la alia fenestreto, tra kiu oni povis observi la maran flankon.

Tiel ili atendis la okazontaĵojn. —

Nun hodiaŭ ankoraŭ kelkajn vortojn pri la brava nigra kuiristo Bim, kiu estis forlasinta siajn parencojn por serĉi siajn amiketojn Tim kaj Tam. Unufoje, dum la veturado per la granda ŝipo, li kredis, ke malproksime li vidas barketon kun du ensidantoj: Sed kiam li volis rigardi pli precize, li vidis plu nenion. La ŝipo baldaŭ atingis la kontinenton. Bim albridiĝis kaj tuj komencis serĉadi laŭlonge de la marbordo. Li konkludis, ke la barketo kun la du knaboj certe ie trafis la bordon, se ja ili sukcesis eviti pli malbonan sorton. Sed pasis semajnoj, sen ke li trovis postsignon de la knaboj. Tamen li ne perdis la esperon kaj daŭrigis la serĉadon.

La titolon desegnis C. A. Pruissen (16-jara) en Amersfoort, Nederlando, la du ilustraĵojn Valto Tuokko (16-jara) en Petäjärvi, Finnland.

Kial mi kolektas poŝtmarkojn?

Kolekti poŝtmarkojn havas ne nur amuzan sed ankaŭ edukan valoron. Antaŭ ĉio mi pligrandigas miajn geografiajn sciojn, ĉar ĉiam kiam mi ricevis markon el malproksima terparto, kiun mi ankoraŭ ne konas (ekzemple el malgranda insulo), mi regule serĉas ĝin en la landkartaro. Kolekti poŝtmarkojn havas ankaŭ ĝeneralan edukan valoron, ĉar eldono de novaj markoj plej ofte okazas por soleni gravan nacian evoluon, por honorj eminentajn politikulon, scienculon aŭ artiston, aŭ por memori gravan historian okazaĵon. Pri ĉiuj ĉi aĵoj oni aŭdas kaj lernas kolektante poŝtmarkojn. Fine, kolekti poŝtmarkojn havas ankaŭ materian valoron, ĉar ju pli malnoviĝas poŝtmarko, des pli granda fariĝas ĝia valoro. Tial bela kolekto kolektita dum mia juneco povos havi tre grandan valoron, kiam mi estos plenkreskinta homo.

Mario Rigo, Trieste (13-jara).

*

Mi kolektas poŝtmarkojn, ĉar per ili mi kleriĝas. Unu montras al mi okazintaĵon en tiu malproksima lando, alia montras kutimon aŭ industrion en tute alia regiono. Tiamaniere ĉiuj lernigas al mi plej agrable multegon pri nia tuta terglobo. Kaj, ĉar mi ŝatas la mondon, mi ankaŭ ŝatas la kolekton de poŝtmarkoj.

C. A. Pruissen, Amersfoort (16-jara).

*

Dum du jaroj mi jam kolektas poŝtmarkojn. La poŝtmarkoj tre multe ĝojigas min. Pro mia sciemo mi fariĝis „filatelisto“. Kiam mi rigardas mian kolekton, kiu enhavas du mil markojn, mi estas en spirito viro multvojaĝinta tra fremdaj landoj. Per poŝtmarkoj oni bone lernas geografion. Ĉar la kolektaĵo kaj landkartaro ĉiam apartenas kune. La poŝtmarkkolektado estis por mi la instigo por lerni Esperanton. Pro tio mi multe korespondas en Esperanto pri interŝanĝo de poŝtmarkoj. Poŝtmarkkolektado estas amuzo kaj sporto, kiu edukas al pureco kaj per kiu oni povas alproprigi al si sciojn. **Rudolf Arnold, Oberwüerschnitz.**



La vivantaj ludiloj.

Ūrsidoj trinkas kun granda ĝuo el la botelo, ankaŭ se tiu estas en mano de infano.

Mi kolektas poŝtmarkojn tial, ĉar mi ŝatas belajn bildojn. Poŝtmarko ja estas artaĵo. Kun granda ĝuo mi rigardas ordigitan poŝtmark-kolekton. En ĝi mi trovas portretojn de famaj personoj, belegajn vidaĵojn de la mondo, kaj ĝenerale poŝtmarkoj rakontas el la historio de ĉiuj landoj. — Poŝtmarko estas ankaŭ propagandilo por Esperanto. Per nia lingvo oni povas plej bone kolekti poŝtmarkojn. Se iu demandas min, kiel mi povas ricevi poŝtmarkojn el eksterlando, mi respondas tuj: per Esperanto. Certe tiu demandas plu: kio estas Esperanto? Kaj kun

plezuro mi estas preta doni klarigojn pri la lingvo. Do mi kolektas poŝtmarkojn por propra ĝojo kaj por propagandi Esperanton.

Valto Tuokko, Petäjärvi (16-jara).

*

Poŝtmarko de Tomo: La gajnitaj poŝtmarkoj estas forsenditaj, kaj mi esperas, ke en la pakajo troviĝu multaj, kiuj ankoraŭ mankas en la kolektoj de la gajnintoj. Dankon pro via intereso! Mi plu kolektas por vi kaj okaze mi denove aranĝos malgrandan konkurson.

RONDODANCO.

Laŭ konata sudslava melodio kantebla.

Knaboj:

Ni salutas kore vin,
samideaninoj!
Ni en danco turnu nin,
junaj vi knabinoj!
Estu tie ĉi,
Restu nun kun ni!
En fidela rondo nia
ni interfratiĝu,
En rapida danco nia
ni nun amikiĝu!

Knabinoj:

Estu salutata vi,
aro familia,
Estu tre bonvena vi,
rond' internacia!
Estu tie ĉi
Restu nun kun ni!
La tutmonda infanaro
frate jen kuniĝu,
Juna esperantistaro
kantu kaj turniĝu!

Originale de **Franjo Modrijan**, Ljubljana.

Henriko kaj Alberto babilas.

„Se vi havas milionon da markoj, kion vi farus?“ demandis Alberto Henrikon, kiam ili vagis sur ŝoseo.

„Mi“, respondis Henriko, „aĉetus belegan aŭtomobilon kaj veturus dum la tuta tago.“

„Tion mi ne farus“, diris Alberto, „mi pli ŝatus aĉeti rajdĉevalon. Tio ja estas multe pli bela.“

Dum la plua daŭro de la babilado provas Henriko konverti Alberton, kaj aliflanke Alberto volas konvinki Henrikon.

Intertempe alveturas bela aŭtomobilo. Ĝi devas flankenveturi pro veno de alia veturilo; veture ĝi atingas ĝin, preterrapidegas kaj forŝiras stratan limŝtonon. Pro tio ĝi falas flanken kaj rompas antaŭradon. Riparo, insultado, ĉagreno kaj malbonhumoro.

Pli poste ankaŭ venis plezurajdanto kun sia ĉevalo. Subite la ĉevalo havas la kapricon starigi sin pro iu kaŭzo sur la malantaŭajn kruojn kvazaŭ hundeto. La rajdanto falas teren kaj devas lami pro elartikigo de piedo.

Henriko nun alrigardis Alberton kaj demandis: „Ĉu vi ankoraŭ ŝatas havi ĉevalon?“

„Ne“, diris Alberto.

Alberto redemandis Henrikon: „Ĉu vi ankoraŭ volas havi aŭtomobilon?“

„Ne“, diris tiu. „Cetere, mi ankoraŭ ne havas la milionon.“ Ilj ĉesis babili kaj daŭrigis sian vojon.

Traduko el la germana kaj linole-gravuraĵo de **Peter Schäfer, Köln (20-jara).**



Ekzamenu vin mem!

Ĉi-foje mi prezentas al vi tute alian taskon ol ĝis nun. Vi devis trovi ĝis nun erare presitajn vortojn. Hodiaŭ mi nomas al vi la vortradikon „**san-**“, kiun vi per helpo de prefiksoj kaj sufiksoj transformu al novaj vortoj (ekz.: malsano, saniga ktp.). **Sendu la trovitajn vortojn al mi. Tiuj tri, kiuj trovas la plej multajn, ricevos 15 poŝtmarkojn por korespondado.** **T o m o.**

Tio povos esti utila ...

La kardinaj punktoj: nordo, sudo, oriento kaj okcidento estas tre simple troveblaj, kiam mankas kompasoj. Oni prenas poŝhorloĝon (kiun oni preskaŭ ĉiam havas) en la manon tiel, ke la malgranda montrilo montras rekte al la suno. Nun imagu linion ek de la horloĝomezo tra la interspaco inter montrilpinto (malgranda) kaj la cifero 12 — ĝi montras rekte suden. Kaj kie estas nordo — oriento — kaj okcidento . . . ?

Kl. †.

Donaci ĝojigas la koron!

Ĉe la venonta kristnasko-festo ni estu ne nur ricevantoj, sed same ni estu donacantoj!

Malgraŭ mizeraj tempoj ni ne malhavu la ĝojon de la donacado. Se inter ni estas iuj, kiuj disponas pri pli grandaj rimedoj, ili serĉu malriĉan familion por heligi ĝian kristnaskan nokton. Lernejo-kamaradon, kies patro estas senlabora, ni ĝojigu per praktikaj aĵoj. Multaj bezonas la plej necesan. Ne plu uzatajn, sed ne tro uzitajn mantelojn, ŝtrumpojn, botojn, ĉemizojn kaj kalsonojn donu al tiuj, kiuj malvarmas. Se

Alproksimiĝas kristnasko!

Kiu sendos kristnaskajn rakontojn, pri-skribojn de kristnaskaj kutimoj kaj moroj, kaj kristnaskajn desegnaĵojn? Donaco atendas la sendantojn! Lasta sendotago: 1-a de decembro.

vi estas grandanimulo: rezignu pri iuj agrablaj kaj cedu ilin al malriĉaj konatuloj! Ni memoru la malnovan proverbon: ĝojo, kiun ni kaŭzas en alia koro, revenos en la propran. Donaco restas donaco, eĉ se ĝi estas eta, memfarita aĵo. Kaj ni gejunuloj ne nur estu scivolemaj, kiajn donacojn ni ricevos, ni ankaŭ surprizu niajn gepatrojn, gefratojn kaj geamikojn per donacoj!

*

Kaj mi volas iomete subteni vin, trovi praktikajn objektojn. En ĉi tiu numero mi donas kelkajn konsilojn, kaj en la venonta numero sekvos pluaj. Hodiaŭ mi instruas vin pri la farado de ladformiloj por bakajoj kaj la konstruo de najlujo. En la venonta numero mi priskribos la faradon de submetilo por gladilo, la konstruon de laŭcela kristarbingo kaj de fruktostabloj. Krome, se mi sukcesos ellabori ĝin, praktikan manlaboraĵon por knabinoj.



Ĉi tie vi vidas la faradon de la figuroj el konservajuja lado por premtranĉi bakajojn.

Unue ion por la kristnaskaj preparoj. Ofte vi jam forĵetis konservajujojn el lado. Ĉu vi scias, ke tiajn malplenaĵojn oni povas uzi por multaj utilaj celoj? Ekzemple: Per rondprenilo oni ondigu simple la supran randon kaj oni povas uzi ĝin por premtranĉi sukerbakajojn. El la lado mem oni povas formi specialajn figurojn uzablajn por premtranĉi kuketojn. Por ĉi tiu celo oni tondus ladstriojn en larĝeco de 2 cm. La supran randon oni fleksu runde. Per rondaŭ platprenilo oni nun formas diversajn figurojn: stelojn, bestojn, literojn, florojn aŭ nombrojn.

Oni faciligas la manipuladojn, se oni alutas prenilon, kies ambaŭ randoj estu rondfleksitaj, por ke ĝi ne vundu la manon. Ĉar la lado de la konservajujoj devas esti bone stanumita, ĝi tre taŭgas por tiaj formiloj. Tiajn bakajformilojn oni multe uzas por kristnaskaj bakajoj, tiaj faru ilin baldaŭ. Sed kiam vi tondas la ladon de la konservajujoj, ne uzu bonan tondilon de la patrino, sed sufiĉe malnovan...

Ĉu en via domo jam troviĝas najlujo? Oni evitas multan ĉagrenon kaj koleron, kaj precipe tempoperdojn, kiam oni havas najlujon. Tio estas najlokesto, en kiu estas ordo, kaj

Adresu viajn skribaĵojn jene:

AL TOMO

ĉe Heroldo de Esperanto, Köln, Brüsseler Strasse 94, Germanujo

kie estas ordigitaj la najloj kaj ŝraŭboj laŭ grandoj kaj specoj. Por malgranda mastrumejo sufiĉas nealta cigarkesto kun pli aŭ malpli da fakoj faritaj same el cigarkesta ligno. La faktabuletojn oni kunnajlas per cigarkestaj (plej malgrandaj) najletoj, aŭ oni fiksas ilin per izolrubando aŭ eĉ per glu-

plastro. Kiam vi volas glui la faktabuletojn, ne uzu tiel nomitan kontorgluajn, sed bonan ostgluajn. Fari najlokeston laŭ ĉi tiu metodo estas tiel facile, ke eĉ la pli junaj el vi kapablos fari ĝin sen specialaj malfacilaĵoj. Kaj al via gusto rilate al ekipo vi povos lasi liberan vojon.

Kaj nun al laboro! Kiu raportos por la antaŭkristnaska numero de „Nia Revueto“ pri la antaŭkristnaskaj laboroj?



Jen la preskaŭ preta najlujo. Bone vi povas vidi la faketojn por la div. najloj kaj ŝraŭboj.


Niridu foje!

La ŝparemaj skotoj.

Post la ŝipoj kutime flugas mevoj, kiuj kaptmanĝas la restaĵojn forĵetitajn de la ŝipistaro.

Iam veturis ŝipo sur la maro. Subite la ŝipisteto, kiu sidis en la mastkorbo, vokis laŭte: „Mi vidas ŝipon!“ La ŝipestro observe rigardis kaj ekridis: „Flugas neniu mevo post la ŝipo, ĝi povas esti nur skota ŝipo.“

Sendis Irmgard Selmann, Gohlis, Germ. (12-jara.)



La savanta leonfelo!

Korespondon deziras...

Kondiĉoj: senkosta publikigo ĉe nepra aldono de aĝo kaj preciza adreso kun indiko de deziroj. **Morala devo:** respondi almenaŭ unufoje al ĉiu.

Siegfried Naumann, 9-jara, Johannes-Allee 12, Grossenhain, Sa., Germanujo, volas korespondi kun infanoj en aliaj landoj. Sendu bildkarton!

Valto Tuokko, 16-jara, Ryhma, Petäjärvi, Finnlando, deziras korespondi kun gesamideanoj de tutmondo. Kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, ĵurnalojn kaj ilustritajn gazetojn (en Esperanto kaj naciaj lingvoj).